Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 24 — trimonata

4/94

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: Stefan MacGILL

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Németh József
H-8500 Pápa, Kilián ltp. 75/9
Tel.: + 36-89-315-836 (hejma kun respondaparato)

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

ENHAVO

1 MacGILL, Stefan, Nova ondo da lernolibroj (tema enkonduko)
5 *Ludu kun ni*, kajero 1 (Elisabetta Formaggio); recenzas smg.
9 Laŭpaĝa resumo gramatika de la supra verko kaj specimena kanto.
13 TELLER, Angela, recenzo pri *Tendaraj tagoj*, kajero III.
14 Citoj el ceteraj recenzoj, priskribo de la anglalingva gvidilo al TT1.
16 *Kunvojaĝu* (Paŭlo Gubbins), laŭĉapitra priskribo (smg)
21 Mendilo por libroj de ILEI kaj *Juna amiko* por 1995/96.
23 Mazi proksimiĝas: raporto pri la vidbenda projekto.
24 PITT, Arnold, recenzo pri *Mil unuaj vortoj en Esperanto*.
26 DAHLENBURG, d-ro Till, recenzo pri *Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado* (Mag. Irena Szanser).
29 Mallonge ni mencias... diversajn instrulibrojn (smg) ; Leterkesto
33 Celaro por *Internacia Pedagogia Revuo*.
35 Adiaŭaj vortoj; Konatiĝu kun la nova redaktoro. (km/smg/nj)

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: d-ro Duncan Charters, 25 Elsah Hills Drive, Elsah, IL 62028-9750 Usono; tel. 1-618-374-2453, fakso: 1-618-374-5122. Internet: charters@csc1.prin.edu. *(Kunordigo, planado, rilatoj kun UEA kaj la movado, instruista trejnado)*

Vic-prezidanto: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. *Eksteraj rilatoj, statistikado, instruado de infanoj.*

Sekretario: Marija Beloševič, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb-Crnomerec, Kroatio. Tel. (38 41) 57 60 92. *Landaj sekcioj, membro-varbado, konferenca administrado kaj ne-faka programo.*

Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*

Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.*

Membro: D-ro So Jinsu, Dept. de Ekonomiko, Univ Kangnam, Kugali Kihung-up. Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900, Koreio. Tel. (0331)281-5500. Faks. (0331)281-3604. *Universitata agado. Konferenco 1994.*

Membro: D-ro Till Dahlenburg, Feldstr. 13, DE-19412 Brüel, Germanio.Tel. (49 38483) 528. *Ekzamenoj, faka konferenca programo. Metodikaj seminarioj.*

Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI. Servoj al instrustoj, trejnado de instruistoj.*

Estrara komisiito: Stefan MacGill, Fácán köz. 9/2, HU-2030 Érd, Hungario. *Eldonado*

Nia gazeto IPR urĝe bezonas pli da aktivaj kunlaborantoj kaj pli vastan gamon de kontribuantoj. Ĝi serĉas novajn membrojn por la redakcia teamo, prefere kun komputila aliro kaj sperto. Vidu paĝojn 34 kaj 35 kaj la dorsan kovrilon por detaloj. **Anoncu vin al la komisiito pri eldonado.**

Nova ondo da lernolibroj

Jam en laborplanoj de ILEI fine de la okdekaj jaroj figuris ambiciaj celoj pri aperigo de "ĉiuspecaj lerniloj por ĉiu aĝ-grupo kaj kategorio de lernantoj."

En tiu tempo preskaŭ ĉiuj lerniloj estis libroj, plejparte dulingvaj, tradici-aspektaj kaj laŭgramatike formulitaj. Ĉefa escepto estis la tiam aperinta libro por mem-lernantoj "Saluton!" de Audrey Childs-Mee.

ILEI ne havis la fortojn ataki ĉiujn aĝ-grupojn aŭ specialajn bezonojn samtempe, sed elektis la mez-lernejan grupon por komenci, esperante trovi fortojn aŭ helpantojn por la aliaj bezonoj iom poste.

Rerigardante nun, ni povas konstati, ke okazis signifa pozitiva transformo tra la lastaj kvin jaroj, en kiu ILEI ludis aktivan rolon, sed aliaj agantoj figuris samgrave. La lanĉo de kursoj en komputilaj retoj, kaj de kelkaj vid-bendaj kursoj signalas foriron de plena superrego de libroformaj lerniloj. Mil tricent antaŭmendoj por vidbendo *Mazi* atestas grandan interesiĝon kaj sopiron por elektronikaj lerniloj.

Sed la ĉefa celo de ĉi tiu numero de IPR estas esplori la novajn lernilojn kaj apogajn librojn de la lastaj jaroj, unualoke po unu verko por la tri bazaj aĝ-kategorioj solvendaj. Infanoj (7-10-jaraj), junuloj (10-14), kaj la universala aĝo (15-115). Ĉiuj cel-lingvaj, situaci-bazitaj, paroligaj, celataj por uzo sub la givdo de instruisto en grupo, klaso aŭ kurso.

La *Fundapax* projekto de Unesko nun ligas 58 lernejoj en 21 landoj kaj permesas relative seriozan bone financatan enkondukon de Esperanto al infanoj. Premiso por tio estas la haveblo de unu universale taŭga lernolibro, por ke ĉiu lernu komunan enhavon kaj povu korespondi, ĉu papere, ĉu elektronike. La pretigon de la libro prizorgis la "Esperanto" Radikala Asocio (E.R.A.) en Italio. Tiulande kuŝis preta sed ne eldonita materialo, de s-ino Elisabetta Formaggio. La engaĝiĝo de E.R.A. kaj *Fundapax* signifis, ke sufiĉa investa kapitalo estis havebla por digne kaj taŭge eldoni la materialon. Por 8-jaruloj la desegna kaj prezenta vesto de la lernolibro povas signife kontribui al lernemo, ĉar motivigo je tiu aĝo estas ĉefe emocia kaj ne intelekta. Ironie, ke ILEI, kiu nominale estas la monda kunordiga instanco por esp-istaj instruistoj, nek povus eldoni libron tiom taŭge, nek liveri oficejon kun sufiĉaj administraj fortoj por

subteni tian projekton. Bone, do, ke aliaj povas. Recenzon kaj detalan priskribon pri la nova libro *Ludu kun ni!* (kajero unu) vi trovos tuj post ĉi tiu enkonduko.

La dua aĝ-grupo, la jun-adoleskoj, estis tiu por kiu ILEI mem eklaboris per la tri-kajera serio *Tendaraj tagoj*. La unua aperis en 1991, la dua en 1992. En 1993 necesis jam represi (kaj iom revizii) la unuan kajeron, kun la lasta kajero naskiĝinta en 1994, ĉiu en eldonkvanto de 2000. Du-kolora preso kaj allogaj bildoj de Pavel Rak kontribuis al la aspekto, sed pro limigita eldonkapitalo, la materialo, precipe en la dua kajero, estas iom kunpremita sur la paĝoj. La vendostatisitko de la Libroservo de UEA por 1994 montris, ke kaj la freŝe eldonita tria kajero kaj la ĉiam bezonata unua kajero troveblis inter la 20 plej vendataj verkoj. Klare, restas ĉiam stabila merkato por la unua kajero, sed multe pli limigitan por la postaj kajeroj. Tio zorgige pensigas, ke la plimulto de lernantoj neniam progresas post la elementa stadio, kaj fakte majstras nur etan onon de la lingvo — ili gustumas ĝin, sed ne satmanĝas. Jen nedezirata flank-efiko de la relativa facileco de la lingvo.

Ni dezirus konigi pli vaste, ke la tria kajero estas tia, ke ĝi povus kontribui instige eĉ al kursoj por plenkreskuloj — ĝi meritus trovi pli vastan uzantaron. Pri *Tendaraj tagoj* ni prezentas unu aperintan recenzon plene kaj citas el kelkaj aliaj. Necesas por tiu serio, post la laboroj por *Mazi*, eldoni sonbendon, instruistan gvidilon kaj laborlibrojn. Se leviĝos neceso reeldoni la unuan kajeron, ĝi certe ricevos fundan reverkon de la komencaj paĝoj por pli verbo-centrigi ĝin kaj permesi pli fruan aktivigon de lernantoj en grupo.

Aperis lastatempe de nia brita sekcio 11-paĝa anglalingva gvidilo por la unua kajero. Ni resumos ĝian enhavon.

Meze de la TT eldonado, ILEI ricevis manuskripton de kurso kreita de la brito, Paŭlo Gubbins, kiun li origine kompilis por instrui nur du kursanojn! Ĝi impresis taŭge, kun bona baza situaciaro, multaj dialogoj kaj skribaj ekzercoj. ILEI interesiĝis, sed ne povis samtempe eldoni du librojn. Ĝi do rilatis kun eldonejo Edistudio, kiu jam pli frue petis al ILEI pretigi lernolibron por plenkreskuloj. La preparado ja longe daŭris, kaj enplektis homojn en kvino da landoj. La ĉefaj modifoj estis aldono de pliaj rol-ludetaj aŭ dialogaj taskoj. Nun la libro estas havebla en firme bindita taŭga formo. Ni poste en la numero priskribos ĝin kaj aperigos specimenajn paĝojn, sed lasos formalan recenzon al estontaj numeroj.



Por la libroj de ILEI ni aldonas mendilon, kun iuj specialaj ofertaj prezoj, ĉar fakte baldaŭ estos tempo mendi lernilojn por la nova nordhemisfera lerno-jaro. Konvinku vian lernejon aĉeti klas-kolekton!

Verko	Celata aĝo	Fakte	Variaj prezoj?	Enpaĝiga denseco	Gramatikaj klarigoj
Ludu kun ni	8	7-10	jes, ege	maldensega	apenaŭ
Tendaraj T1	10-14	9-12	jes	adekvata	malmulte
Tendaraj T2	10-14	11-15	jes	kunpremita	malmulte
Tendaraj T3	10-14	12-112	jes	iom densa	iom
Kunvojaĝu	15-115	15-115	tra ILEI	adekvata	multe

Multaj homoj en kaj ekster ILEI laboregis produkti ĉi tiujn novajn lernilojn. Ili fortostreĉo estos pravigita kaj plia evoluo eblos nur se ĉi tiuj aperintaj verkoj estas aĉetataj kaj uzataj. Tiucele oni foje forgesas ekspluati lernejajn buĝetojn por lernila akirado. Se Esperanto ja estas serioza studtemo, tiaj mon-fontoj devas validi por ĝi, same kiel por aliaj studtemoj.

Ni ne volas devigi ĉiun uzi nepre ĉi tiujn aŭ eĉ tiajn lernilojn — instruisto uzu tion, kun kiu ŝi aŭ li sentas komforte kaj kiu respondas al la deziroj kaj bezonoj de la lernantoj. Tamen, se ni havus pli grandan 'stokon' da instruistoj volonte uzantaj modernajn komunik-stilajn lernilojn, ni verŝajne pli vaste kaj pli sukcese povus instrui. Kiel akiri tiun 'stokon'? Unue, ekzistantaj pli tradiciaj instruistoj studu la lernilojn kaj provu laŭgrade ekuzi partojn de la enhavo en la kurso. Ni organizu por tiuj instruistoj konsilajn seminariojn. Due, ni provu konvinki junajn lingvo-instruistojn pri la propedeŭtika kaj aliaj valoroj de Esperanto, por ke ili lernu ĝin kaj apliku al ĝia instruado siajn jam uzatajn lingvo-instruajn talentojn. Forta tiucela konvinkilo, kaj preskaŭ antaŭkondiĉo, estas la haveblo de prezenteblaj taŭgaj lerniloj.

Ni konkludu, ke en 1995 ni pri lerniloj estas en signife pli bona stato ol en 1990, kaj ke en la sekvaj jaroj la emfazo devos transiri al variigo de la instru-rimedoj: son- kaj vid-bendoj, korespondaj kaj komputilaj kursoj, ktp. permesos aliron al lernemuloj, kiujn libroj ne povos atingi.

Ni ĝoju, ke ni nun havas bazan kolekton da cel-lingvaj modernetaj prifiereblaj lernolibroj, sed samtempe ni konstatu, ke la eksterproporcia dependo je libroj devos esti mildigita.

Sed por la momento, libroj super-regas, kiel atestas la sekvaj paĝoj...

Stefan MacGill

LERNOLIBRAJ RECENZOJ

Ludu kun ni (1)

150-paĝa propedeŭtika lingvo-kurso por 7-10-jaraj lernantoj
de Elisabetta Vilisics Formaggio (Italio)

Ĉi tiu lernolibro naskiĝis pro la lerneja projekto de 'Esperanto' Radikala Asocio (ERA), kiu eldonis la libron. Sed la aŭtoro preparis la materialon multe pli frue, kadre de la kibernetika-pedagogia laboro de prof. Frank en la sepdekaj-okdekaj jaroj. Feliĉe, ke ĝi povis atingi konkretan kaj imponan formon — ne nur ĉar al ILEI mankis la rimedoj krei ion por tiu aĝ-grupo, sed krome ĉar ĝi ne estus povinta tiun verkon eldoni en tiom adekvata vesto.

La verko de si mem havas gravajn meritojn; verŝajne historia juĝo epitetos ĝin mejloŝtona. Unue, ĉar la enhavo kaj prezento-maniero estas unike taŭgaj por la celata aĝ-grupo, due ĉar ĝi dispartigas la komencajn partojn de la Esperanta gramatiko kiel neniam antaŭe, eĉ pli ol ekzemple faris Andreo Cseh (kies skemon ĝi tamen proksime sekvas!). Tiu dispartigo estas tiom valora kaj studenda, ke ni laŭpaĝe ĝin resumas. La baza unuo de la verko estas, kiel ĉe modernaj lerniloj, ne plurpaĝa ĉapitro, sed unuopa paĝo aŭ paĝ-duo.

Per tio ni ne volas diri, ke la aŭtoro fine malkovris la perfektan kaj definitivan vicordigon de la elementoj de la E-gramatiko. Ni povus eĉ taksi ĉi tiun vicordon tradician kaj super ĉio mal-verbo-centran. Tamen ĝia detaleco estas laŭdinda, inkluzivante firmigajn ekzercojn kaj kombinigon de temoj. Laŭdendas plie la lerta maniero en kiu la gramatiko estas ligita al temoj kaj situacioj allogaj por la celataj lernantoj, kaj ke ili estas grandparte esprimataj per bildoj kaj praktikaj ekzercoj kun absolute minimumaj eksplicitaj gramatikaj klarigoj — la bone elektitaj ekzemploj kaj instruista interveno formas la klarigojn. La libro havas eĉ laborlibrecajn trajtojn — oni celas kelkpaĝe, ke la lernantoj skribu respondojn aŭ desegnu en la libro mem.

En Esperanto, pli ol en etnaj lingvoj, la ordigo de la temoj estas tre liberaj, oni povus komenci instrui Esperanton sen grandaj problemoj el preskaŭ iu ajn el ĝiaj gramatikaj strukturoj. La nuna verko bazas siajn unuajn 44 paĝojn sole sur la verbo *estas*, nur en paĝo 44 kaj oni enkondukas la du-ligan (transitivan) verbon *havi -on*. Sekvas, sed nur multe poste, *ami -on, vidi -on, preferi -on, ŝati -on* ktp. Apenaŭ aperas transitiva verbo, kiun oni povas tre fizike kaj facile ekzempligi en klasĉambro, ekz. *preni, tiri, puŝi, levi, tuŝi, montri -ON.*

Alia verb-rilata surprizo estas la malfrua enkonduko de la imperativo, nur en la 112a paĝo, longe post eĉ la infinitivo. Ja pravas, ke oni povas multan materialon prezenti sen la imperativo, sed ĝi estas tiom utila por klasĉambra interparolo kaj leranta aktivigo, ke ĝia malfrueco frapas. Cetere, la pasinto kaj futuro, kvankam forme tre facilaj, restas entute ne enkondukitaj en ĉi tiu unu-grada kajero.

Ni konkludas, ke la mal-verbo-centra aliro de la aŭtoro estas intenca (ja oni povas multon fari per nur *estas*) ĉar la lasta paĝo montras dismeton de la materialo en dek blokojn, kies temoj estas aranĝitaj ĝuste laŭ la plej gravaj verboj, la lasta el kiu, *faras*, formas la ŝlosilon al kelkaj pliaj — ĉefe netransitivaj — verboj, kiel *stari, sidi, iri, veni*.

Plia surprizo estis la malfrua enkonduko de *la* (p. 17), sen klarigo de ĝia uzo; tion instruisto devus prizorgi laŭ siaj nacilingvaj kondiĉoj. Duba, la formo 'la mia' (p. 41) kaj uzo de artikolo pri ĝeneralaĵoj en p. 142 (*la* neĝo estas blanka.). Plia surprizo estas la apartigo kaj prokrastigo de *ĝi* kaj *ĝia* disde aliaj pli frue enkondukitaj pronomoj. La prepozicio *al* kurioze ne ricevas propran paĝon, ĝi aperas nur piednote aldona al pli komplika temo en p. 112. Mi ne trovis prezenton de *de* kun signifo *mal-al* , kvankam ĝi estas testita resume en p. 148, kune kun du signifoj de *el*, kvankam ŝajnas, ke nur unu el ili (*el ligno*) estis prezentita. Strange, ĉar *iru al* kaj *venu de* estas praktike kaj fizike uzindaj en klasĉambro, eĉ tute frue en kurso.

Sur p. 97 oni konigas la diversecon de lingvoj en la mondo (trafe por etuloj) per prezento de la multaj vortoj por suno: nur la japana formo, kiun prezentas Noriko 太陽*taj jo* ne troveblas en mia lernolibro: tie mi trovas la multe pli bazan formon: 日 *nichi* aŭ (en kunmetaĵoj *hi, bi*). Kapgratiga estas ankaŭ la frazero: *En la mondo estas mil kaj mil lingvoj*.

Sed la tuto, kaj specifaj paĝoj, surprizas pozitive: p33 tre klare kaj trafe montras la manieron formuli numerojn en Esperanto sen eksplicite diri la regulon 'unu vorto por ĉiu ne-nula cifero.' p 53 kun bildoj de ne-normalaj homoj por aktivigi la uzon de *tre/tro*; p. 102-3 kun lerta kombino de du novaĵoj: *manĝi -on per -o* kaj *trinki -on kun -o*, p. 113 por enkonduki la imperativon, p. 131, kiu invitas lernantojn konjugacii kelkajn bazajn verbojn en sia nacia lingvo kaj kompari la koŝmare komplikan rezulton kun la mirinde simpla Esperanta solvo, p144 kiu lude konigas la sencajn ligojn inter iuj verboj kaj substantivoj — la speco de ekzerco, kiun niaj tradiciaj kursoj simple ne prezentas, ĉar ĝi ne respondas al iu ajn unuopa gramatika kategorio.

La personaj nomoj de roluloj estas ĉiuj laŭ la Esperanta ortografio prononceblaj, sed ne ĉiu finiĝas per -o, ekz. Simbu, Eva, Linda...

Pri la teknika prezentado ni konstatu uzon de grandformataj paĝoj (A4) kun abundaj bild-ekzercoj, kaj mirinda maldenseco de la materialo — la plimulto de paĝoj prezentas nur du-tri novajn vortojn kaj nur unu gramatikan sub-punkton. Presado estas du-kolora (nigra plus ruĝa), kiun oni uzas por distingi gramatikajn elementojn. Escepto estas tri plenkoloraj paĝoj, kiuj prezentas — la kolorojn. La bildojn realigis Anna Formaggio kaj lingvan revizion Fabrizio Pennacchietti.

Aldone al la lernolibro aperis A5-formata 80-paĝa instruista gvidilo paralele en la itala kaj Esperanto. Ĝi donas analizon de la bezono por lingvo-lernado, teorian (propedeŭtikan) pravigon por la uzo de Esperanto, kaj laŭtemajn konsilojn por uzado de la materialo. Ĝi ja ne donas specifajn konsilojn por unuopaj paĝoj. Ĝia enhavo estas la sekva:

1. Teorio kaj praktikaj rezultoj de lingva orientado
2. Kiel apliki la propedeŭtikan metodon?
   - 2.1 Celoj de la prepara kurso kaj ĝia loko en elementlerneja programo
   - 2.2 Atentigendaj konoj kaj kapabloj
   - 2.3 Gradigo de la lingva materialo
   - 2.4 Gravaj metodikaj vidpunktoj
     - 2.4.1 Motiviga enkonduko
     - 2.4.2 Perluda evoluigo de prilingva konscio
     - 2.4.3 Internacieco
   - 2.5 Instruteknikoj kaj rimedoj
     - 2.5.1 La lingvouzo dum la lecionoj
     - 2.5.2 La legado kaj la skribado
     - 2.5.3 Gestoj, objektoj, bildoj
     - 2.5.4 La ludoj
     - 2.5.5 La kantoj kaj versetoj
     - 2.5.6 La korespondado
     - 2.5.7 La lernolibro.
   - 2.6 Kontrolo kaj pritakso de la lernantoj
3. Resumo kaj finaj konsideroj
4. Bibliografio

Ni provos aperigi en estonta IPR kelkajn el la trafaj rekomendoj kaj frazoj el tiu gvidilo. Sekcio 2.3 detaligas la enhavon de la tri gradoj, taksante, ke ĉiu okupu proksimume 50 instruhorojn (t.e. averaĝe po 2,5 paĝoj ĉiuhore). La nuna libro kovras la unuan el tiuj tri gradoj.) La gramatikan apartigon ni ne povas detale raporti, la tema enhavo estas la sekva:

Grado 1: La eta mondo de la infano: familio, lernejo, amika rondo.
Grado 2: Vivo en pli vasta sfero ĉirkaŭ la infano: loĝloko, naturo, socia medio, pasintaĵoj, estontaĵoj.
Grado 3: La Tero: hejmo de la homaro. Popoloj. Landoj. Lingvoj.

Resume, instruisto kutimigita instrui al infanoj de 7- ĝis 10-jaraj malfacile malsukcesus uzante ĉi tiun allogan kaj bone strukturitan libron kune kun la akompana gvidilo. La libro estas liverata de ERA al la kvindeko da klasoj partoprenantaj en sia lingvo-lerna projekto, kies propedeŭtika pravigo speguliĝas en la subtitolo de la libro mem. Ni tamen povos esperi, ke oni multe instruos el ĉi tiu libro pro la propraj meritoj de Esperanto mem, kaj ne nur por prepari la vojon al pli sukcesa posta etnolingva lernado. ERA anoncas prezon

por la libro multlande en enlanda valuto kaj (laŭdinde) forte diferencigita laŭ pagipovo. Ilia adreso: ERA, Via di Torre Argentina 76, IT-00186 Roma; tel. (06) 689791.

Ni povas imagi, ke la propedeŭtika estos la plej eta el la valoroj de la kurso. Plie, ĝi naskos esperantistojn, sed pleje, ĝi liveras valoran novan skemon por la bezonata didaktika gramatiko de la lingvo, kiu influos kaj pensigos instruistojn, edukistojn kaj lernilo-verkistojn celantaj aĝ- kaj interes-grupojn plej diversajn.

smg.

Ĉu ili estas ĝentilaj ?



Konciza laŭpaĝa resumo de *Ludu kun ni* (1)

1. Saluton
2. Estas. Mi.
3. Mi Vi Li Ŝi
4. Kiu ?
5. Ĉu ? Jes Ne.
6. -in- knab-
7. Revizio, firmigo.

8-9. Kia, adjektivoj, ankaŭ.

10. Kia? — -a — -o.
11. Adjektiva kanto.
12. Prononco: k ĉ s ŝ g ĝ j
13. Parol-bobela revizio.

14-15. Kio estas tio?

16. Klasĉambraj objektoj.
17. La
18. En Sur
19. Revizio (vera-malvera?)
20. Koloroj. Kia.
21. Koloroj. Kia — -o?

22-23. Mal-

24. Resumo: ĉu? kiu? kio? kia?
25. Kiom? 1-10. Nombro-kanto.
26. Kiom? Plus kaj minus.
27. Kiom? Pluralo -oj. (1-4)
28. Kiom? Pluralo -oj (1-9)
29. Substantivaj kategorioj.
30. Kiom-kia-kio: Ses ruĝaj pomoj.
31. Ni Vi Ili. -aj
32. Kanto: -a, -aj.
33. Kiom? 1 ĝis 3000. Numer-skribado.
34. Kiom da -oj?
35. Kiom da -aj -oj?
36. Multaj, malmultaj
37. Prononc-ekzercoj.
38. Revizia fraz-farado.

39-40. Posedaj pronomoj. Mia, via..

41. La mia.
42. Ĝi. Objektoj, bestoj, kategorioj.
43. Ĝia. Ĝiaj -oj estas -aj.
44. Havas -on.
45. Kiu havas kion?
46. Nominativa leksika revizio.
47. Kion havas la homoj?
    Ĉiu havas kvin objektojn.
48. Rimaĵo pri korpo-partoj.

49-50. De por esprimi apartenon.

51. Vestaĵoj. Transformo:
    La -o de -o estas -a ⇒ -o havas -an -on.
52. -o havas -an -on. (Vestaĵoj)
53. Tre Tro. Kio estas ne-normala?
54. Prononc-ekzercoj.
55. Revizia finaĵe kompletigenda rakonto.

56-57. Familio Bo. Aĝoj, kvalitoj, rilatoj

58. Aplikado de -in-, ge-
59. Lernejo. -ist-, -ant- -in-.
60. Lernejo de lernanto: kiom? kio?
61. Modela letero ek-koresponda.
62. Amas -on. (familie).
    kiu, kiun, ĉiu, ĉiun.
63. Amas min, vin, lin, ŝin, ilin.
64. Kanto: Mi amas la mondon.
65. Bilda ekzerco pri la kanto.
66. Bestoj en familio Bo. Havas -ojn.
67. Demandoj pri bestoj de lernantoj.
68. Besto-familioj: vir-, -in-, -id-.
69. Pribesta dialogo.

70-71. Vidas -on. (afrikajn bestojn.)

72.. Kion vidas? (laŭ bildoj)

73. Vort-listo (celo neklara)

74-5. Faras -on. (en senco de
    fabrikas, preparas, trikas)

76. Faras -on el -o. (el ligno)


77-79. instruas fari -on. lernas fari -on.
    (origamo: japana paper-faldado)


80-81. Kion faras? (unu-ligaj verboj)
    Staras sidas kuŝas dormas

82-83. Flugas naĝas saltas biciklas

84. Revizia bild-teksta parigo kaj kompletigo.
85. Sonĝas, ke... (revizio supraj verboj)

86. lernas -i, kapablas -i (ekzemploj)
87. sama enhavo, sed ekzercoj.
88. Ĉu vi kapablas -i? Jes/Ne.
89. Sonĝas ke... (-o kapablas -i)
90. Lernas -i (skribi, legi, nombri, kalkuli)
91. Lernas -i (desegni, kanti, muziki, gimnastiki)
92. Kion ili faras? Ili skribas. Ili skribas -on.
93. La bildo-kartoj de sinjoro Bo.
94. Kion ili faras? Ili legas. (kion?)
95. Letero por legi. (kun ferio-fotoj)
96. Kion ili desegnas? Kion vi kapablas desegni?
97. La nomoj de la suno divers-lingve.
98. Ludas kun -o. Revizio: ĉiuj.
99. Venas ludi kun. Venas Iras.
100. Ludas per
101. Kun aŭ per. Kontrastigo.
102. Manĝas -on. Manĝaĵoj. per forko ktp.
103. Trinkas -on. Trinkaĵoj. kun sukero ktp.
104. Manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.
105. Malsatas soifas deziras -i.
106. Li deziras -on. Li deziras fari -on.
107. Ŝatas -on, Preferas -on.
108. Firmigaj dialogoj. (kun/sen)
109. Vortlistoj (celo neklara)
110-11. Klasĉambra bildo. Kion faras...?
112. La mateno. Mi lavas min ktp. Al.
113. Imperativo. sama situacio: Lavu vin!
114. ordonoj. Imperativoj. Iru al... legu libron.
115. Malpermesoj. Negativaj ordonoj.
116. Matena kanto. (-u kaj refleksivo)
117. Instigoj: Ni iru...
118. Bondeziroj kaj salutoj. (-on!)
119. Bondezira kanto.
120. Ĝentilaj kaj malĝentilaj formoj.
121. Sama: bonvolu -i.
122. Literoj — vortoj — frazoj
123. Leksiko kaj prononca revizio
124. Faru vortojn el la literoj.
125. Revizio de substantivoj.
126. Asigno de substantivoj al kategorioj.
127. Resumo de adjektivoj.
128. Radikoj uzeblaj substantiv kaj adjektive .




Mi LEVAS min.



2	1	dudek	unu
2	2	dudek	du
3	1	tridek	unu
3	2	tridek	du
4	4	kvardek	kvar
4	5	kvardek	
5	6		
6	7		
7	8		

FARAS

129. Resumo kaj klarigo de de pluraloj: -aj -oj
130. Resumo de verboj. -as.
131. Skribu en via lingvo! Bazaj verb-konjugacioj.
132. Radikoj uzeblaj substantive kaj verbe.
133. Telefona konversacio.
134. Resumo de infinitivaj verboj.
135. Resumo de imperativo. (kanto: London' brulas)
136. Resumo de verbo-finaĵoj: -as, -i, -u.
137. Pliaj uzoj por -in- kaj ge-
138. Pliaj uzoj de -id- kaj mal-
139. Enkonduko de la sufikso -il
140- 41. Kunmetitaj vortoj: telefon-libro ktp.
142. Fraz-konstruado kun *estas* kaj unu-ligaj verboj.
143. Fraz-konstruado kun *havas* kaj *Kion faras*?
144. Kion ŝatas fari -o? (krucenigmaj respondoj)
145. Bildaj situacioj: Kion ili diras?
146. Resumo de demandoj: ĉu, kio, kiu, kia, kiom, kion faras
147. Ekzerco por elekti ĝustan demando-vorton.
148. Resumo de prepozicioj: en sur al el kun per sen de da
149. Bildoj postulantaj frazojn.





150. La dek lern-unuoj:


Temo	Unuo	Paĝo
estas	1	1
	2	14
	3	25
havas	4	39
amas	5	56
faras	6	74
	7	90
	8	102
	9	112
ripeto	10	122







Kiu faras kion ?



Specimena kanto el "Ludu kun ni" (paĝo 32) kiu emfazas adjektivojn en singularo kaj pluralo:

MUZIKO



KANTO



Tilo estas bona knabo, la-la
simpatia kaj ĝentila, la-la
eleganta, la-la
diligenta, la-la
ĉiam gaja kaj kontenta, la-la



kaj ni ĉiuj estas bonaj,
simpatiaj kaj ĝentilaj,
elegantaj, diligentaj,
ĉiam gajaj kaj kontentaj.
la-la...

Tendaraj tagoj — Kajero 3

Stefan MacGill. Eldonis: ILEI/UEA/HJEA, Budapeŝto, 1993. 76p. 29 cm. Ilustrita de Pavel Rak. ISBN 963 04 3957 3. Prezo: 18,00 GLD. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj ĉe UEA, ekde 4 ĉe ILEI. Speciala prezo ĉe ILEI por la tri-kajera kompleto: 39,00 NLG. Ĉe ILEI la prezoj inkluzivas la surfacajn sendokostojn.

La tria — kaj lasta — de la serio *Tendaraj tagoj* estas nun havebla kaj kompletigas la memstaran kurson de Stefan MacGill por la instruado de Esperanto. Ĝi estas serio kiu kombinas amuzajn ilustraĵojn (de Pavel Rak), viglajn tekstojn kun tre klara prezento de la gramatiko. Pli grave eĉ, tra la tuta kurso troveblas subkaŝanta tem-fluo, ke Esperanto estas serioza lingvo, kun grava celo kaj kiel pruvo de tio, ĉiuj tri kajeroj estas firme radikumitaj en internacia kulturo. Ĉi tiu lasta kajero kuntiras la fadenojn kaj prezentas paĝojn de bazaj, utilaj kaj aktualaj informoj pri Esperantujo por junaj lernantoj, klarigantaj kion ili povas fari, kien ili povas iri — plulanĉantaj ilin. Ilia estonteco estas prizorgita, kiel ankaŭ la historio kaj kulturo de Esperanto kaj estas ĝojige vidi ĉi tiujn iĝi integra parto de la lingvo-studado.

Rapida rigardo informas, ke la tria libro estas multe pli dika ol la aliaj du, sed pli proksima inspektado indikas, ke ĝi ne portas signife pli da gramatiko. Ĝi ja posedas abundan lego-materialon konsistanta plejparte el bone konstruitaj rakontoj kiuj entenas la rilatan gramatikan punkton. Mi surpriziĝis, ke iuj el la rakontoj estas tiom longaj, kaj ke iujn paĝojn inundis teksto kaj min demandis, ĉu infan-grupoj, kunvenantaj malofte kaj mallonge, ne estus timigitaj pro tio. Tamen, miaj propraj infanoj malpruvis tion. Estante longtempe fervoraj ŝatantoj de la humursento de la aŭtoro, ili rapidis tra rakonto post rakonto kun granda plezuro.

Re-enkonduko de la ŝlosilaj roluloj komence de la libro signifas, ke ĝi facile povus funkcii kiel memstara 'riĉiga' libro por grupoj de plenaĝaj lernantoj aŭ simple amuza endormiga legaĵo.

Por infanoj estas la humuro kaj ilustraĵoj, kiuj uzindigas la libron. La rakontojn ili trovis amuzegaj, la bildoj sorĉaj — la kamelo iĝis plej bona amiko! La emfazo je gramatiko estas modera kaj subtila, kaj tion ili aprobis. Ili lernis kaj ekzercis nature sen vere konscii pri la subkuŝanta strukturo — tre bona metodo por lingvo-lernado.


Por mi la plej grava aspekto de la tria libro estas la interesa kaj originala maniero en kiu la ofte obskura problemo de transitivaj

/netransitivaj verboj estas servita en buŝ-mezuraj pecoj pretaj por engluto flanke de la lernantoj. Kiu ajn, plenkreskulo aŭ infano, kun nur nebula ideo kiun uzi kiam, povus profite kaj sendolore lerni ne erari.

La rol-ludoj, geografiaj faktoj, la ekzemploj de leteroj kaj diversaj stiloj de manskribado igas ĝin firme 'eduk-konforma' kaj el la vidpunkto de instruisto de granda valoro.

Mallonge — juvela libro —. Provu ĝin mem kaj konstatu.

Angela Teller, Britio
Tradukita el Esperanto Teacher, *Autuno 1994.*



Ni konscias pri tri pliaj recenzoj aperintaj pri la tria kajero, kaj ni aperigas eltirajojn de ili.

Franca esperantisto (majo 1994). Skribas LM: "Tiuj komunik-stilaj lerniloj povus renovigi la ofte tedajn E-kursojn, dank' al modernaj situacioj kaj ilustrajoj, i.a. tre plaĉas al mi prezentado de akuzativ-uzo: la fundamenta bezono estas senti la transitivecon aŭ netransitivecon de la verboj, ĉar tiamaniere mi lernis per Cseh-metodo."

Esperanto USA (1994/2). Skribas R. Jaderstrom: "Reaperas la diverslandaj junaj amikoj de la unuaj du kajeroj: Adelo, Patro, Aniko, Luiĝo, Lŝtvano, Habibo, ktp. La antaŭajn aventurojn resumas por ni amiko Roĝero pere de letero al siaj gepatroj. Reaperas de la dua kajero ankaŭ Agento 005, aventurante en Volapukistano. ... La diversajn ekzercojn oni sentas ankaŭ inundaj. Ilin sufiĉe praktikante, la lernanto pli kaj pli aŭtomate evitos erarojn kaŭzatajn interfere de aliaj lingvoj. Kiel diris mia profesoro de la rusa lingvo, parolante pri misdiroj originantaj en la menso: 'Via lango devas protesti!'"

Kancerkliniko (apr.-jun. 1994). Skribas Ĵak LePuil: "Aĥ! Ŝatus mi aĝi inter dek- kaj dekkvarjara! Tiuj Temndaraj tagoj tutplenas de ludoj, skeĉoj, desegnoj, rakontoj, enigmoj, krucvortoj kaj eĉ fotoj. Absolute ne eblas ne trovi ion laŭ la gusto de l'plej apatia infano. Kompreneble nepre necesas trovi la taŭgan instruanton por gvidi la junulojn tra tiu labirinto ... Do, instruontoj, sekvu staĝon kun ILEI por brile elturniĝi kun tiu demona lernolibro. Nur etan riproĉon: tro da materialo en paĝo; sed mi imagas, ke kulpas la eldonkosto... Kiu mecenato pretas aerumi tiun mirindan lernolibron?"

Gvidilo anglalingva por Tendaraj tagoj, kajero 1. Verkis Malcolm Jones. Eldonis: Esperanto Teachers Association. 21 x 29.7 cm, 11p. ISBN 1899391 02 9.

La enkonduko alparolas lernantojn mem por helpi ilin pli facile uzi la libron en kurso, kaj eĉ ebligi ĝian uzon por sol-studado. La prononcado estas sisteme prezentita.

Sekvas notoj por ĉiu paĝo de la lernolibro, kiuj resumas la novan materialon de la paĝo, donas gramatikajn klarigojn, foje kompletigajn vortlistojn kaj anglalingvajn tradukojn de ĉiuj ekzerc-instrukcioj. Speciale detala estas la trakto de la resumaj gramatikaj paĝoj fine de la lernolibro. (Neeblas ignori la brilan tradukon de *fiŝoj, fuŝoj — fishes, botches*!)


Sur unu paĝo troveblas respondoj al ĉiuj ekzercoj de la libro, ĉiuj en Esperanto. Sur la lasta paĝoj troveblas la vortlisto de la libro (la E-vortoj alfabete) sed kun anglaj ekvivalentoj aldonitaj.

Taŭga por uzo en anglalingvaj landoj, aŭ por ne-esperantistaj internaciaj renkontiĝoj, kie partoprenantoj iugrade scias la anglan, kaj kie du-lingva lernilo por la koncernato eble ne haveblas. Lasta uzo estos por pedagogoj aŭ sekciaj aktivuloj en ne-angle parolantaj landoj, sciantaj la anglan (aŭ konantaj iun kun tiu kapablo), kiuj volus traduki ĝin ĉu en Esperanton, ĉu en sian nacian lingvon. Kiu interesiĝas kontaktu Stefan MacGill (adreso p.2) kaj/aŭ Malcolm Jones (1 Regent Ave, Skipton (N. Yks.) BD23 1AZ, Britio. Mendu la libron de Esperanto-Centro, 140 Holland Park Rd, London, W11 4UF; tel. 071-727 7821. Prezo nekonata. Verŝajne havebla de UEA. ILEI provos akiri stoketon por reform-eŭropo.

Kiam li vidis la NIFOn, li estis...

...gladinta
la pantalonojn,
...gladanta
la ĉemizojn,
...gladonta
la naztukojn.

(el ĉ.87 de TT3)



Paul Gubbins

KUN VOJAĜU



EDISTUDIO ⊖ ILEI

Ĉi tiu 240-paĝa lernolibro estas firme bindita kun kolore presita kovrilo. Ĝi konsistas el 25 ĉapitroj kaj prezentas praktike la tutan Esperantan gramatikon ekde la komenco, kun klarigoj en Esperanto, ekzemploj kaj abundegaj ekzercoj. Ĉiu ĉapitro komenciĝas per dialogo, klarigoj kaj ekzercoj pri la nova enhavo, legaĵo pri ligita temo, skribaj taskoj (formulu telegramon, verku leteron k.s.), kaj dialogaj kaj rol-ludaj situacioj. Mapoj kaj reklam-tekstoj variigas la grafikan aspekton. Okcidentanoj mendu de Edistudio (c.p. 213, IT-56100 Pisa, Italio), aŭ aliaj libroservoj. Prezo: 30 NLG. ILEI havas stoketon por loĝantoj de reform-eŭropo. Mendu de ILEI: 900 HUF (plus sendokostoj 120 HUF en Hungario kaj najbar-landen, 240 HUF alilanden.)

Laŭĉapitra resumo de *Kunvojaĝu*

La unua linio prezentas resumon de la trovebla dialogo de la ĉapitro
L = Legaĵo
G = Gramatiko

Ĉ. 1: Nova sekretario, Klara, eklaboras en vojaĝ-oficejo en Britio.
L: Skizo pri la familio Braŭn — s-ro Braŭn estras la oficejon.
G: Kio, kie, kiel demandoj. -o, -a, -e, -as. Sufikso -in.

Ĉ. 2: La panjo de Klara telefonas por ekscii, ĉu Klara dungiĝis.
L: Skizo pri la familio de Klara.
G: -oj -aj, -is, -os. Afiskoj mal- ge-, -ĉj, -nj. Kial, Ĉu.

Ĉ 3: Klara renkontiĝas kun Rikardo Braŭn, la filo de la estro.
L: Paĝo el la taglibro de Klara pri vizito al kinejo.
G: Kiu, Kia, tie, tien. Pronomoj, Sufikso -ej.

Ĉ 4: Klara skribas leteron por starigi kontakton kun japana kliento.
L: La teksto de la verkita letero, proponante vojaĝojn tra Britio.
G: -i, -u. Kiam, tiam, iom. -uj.

Ĉ 5: Iu petas al Rikardo surstrate navigajn informojn.
L: Horaro de enurba aŭtobuso, pri kiu oni demandu.
G: lokaj adjektoj. kiom, ĉiu. -ul, -ind, -on, -e

Ĉ 6: Rikardo petas al Klara bel-tajpi lian labor-petan viv-resumon.
L: La viv-resumo. Rikardo ĵus finstudis en politeknika lernejo.
G: finaĵo -n. tia.

Ĉ 7: Telefona konversacio inter Klara kaj s-roj Braŭn kaj Soŝimoto.
L: Reklamilo de dom-vendisto pri bela domo, kun dom-plano.
G: -ojn, -ajn. tiu. -em, -ebl. la alfabeto.

Ĉ 8: Klara rezervas hotel-ĉambron por s-ro Braŭn en Tokio.
L: Letero, kiu ŝanĝas la datojn de la telefona mendo.
G: por + infinitivo. tio. -eg, -et, -ist, -il.

Ĉ 9: La familio Braŭn vizitas la drinkejon "Verda Stelo".
L: La menuo. Oni povas rol-ludi mendadon de manĝaĵoj.
G: -us. nenio, ĉio, ĉiam. -aĵ.

Ĉ 10: S-ro Braŭn registriĝas en la flug-haveno, la flugo malfruas.
L: Flug-kompania demandilo pri klienta kontenteco.
G: Relativaj pronomoj: kiu, kio, kiuj, kiujn, ktp. -u (volitivo) -ad

Ĉ 11: S-ro B alvenas laca al la hotelo; la mendita ĉambro ne haveblas.
L: Posten-anonco de muzika eldonejo kaj petletero de Rikardo.
G: pli ol, plej. Estas -e, ke... tiel, iu, ie.

Ĉ 12: Rikardo petas laboron ĉe la muzika eldonejo.
L: Aliĝilo de Brita Esperanto-Kongreso.
G: por ke -u. -aĉ, -an, -er. ĉia, io, ial.

Ĉ 13: S-roj B kaj S diskutas estontajn grup-vojaĝojn por japanoj.
L: Prov-reklamilo pri tiuj vojaĝoj tra Britio per busetoj.
G: por ke -u en nerekta propozicio. -ec, da, nenia, ĉiel, tiom.

Ĉ 14: S-roj B kaj S vizitas turisman foiron en Tokio.
L: Brita hotela reklamilo.
G: Nerekta parolo. -op. si, sia. ties, kies, nenie.

Ĉ 15: S-roj B kaj S negocas pri la enhavo de kunlabora kontrakto.
L: El la agendo de s-ro B pri hejmeniro kun haltoj en Usono.
G: -iĝ, -end, -ing. neniam.

Ĉ 16: La familio telefonas al s-ro B en Usono. Rikardo dungiĝis.
L: La akcepta letero, kiun Rikardo ricevis de la muzik-eldonejo.
G: -ig, -um, -obl. tial, iel.

Ĉ 17: S-ro B venas hejmen. S-ino B rakontas pri publika kunsido pri plano konstrui apud-maran aŭto-ŝoseon tra la urbo.
L: Protest-afiŝo pri tiu plano de partio, kiun fondis s-ino B.
G: bo-, eks. ĉie.

Ĉ 18: S-ro B malsanas kaj ĝeniĝas pro nefarita laboro. Oni flegas lin.
L: La televida programo, kiun rigardu malsanulo.
G: Estas + -inta, -anta, -onta. -into, -anto, -onto. -inte, -ante, -onte. ek- -id.. ĉies.

Ĉ 19: Kolera hotel-posedanto atakas la vojaĝ-oficejon pro la kontraŭstaro de s-ino B al la la ŝosea projekto.
L: Akcepta letero de s-ro Soŝimoto pri la grup-vojaĝoj.
G: Estas + -ita, -ata, -ota, -ito, -ato, -oto, -ite, -ate, -ote.

Ĉ. 20: S-ro B proponas al s-ro S, ke li vizitu la Britan Esperanto-Kongreson kaj prelegu tie. Klara petas salajro-altigon.
L: La propona letero al s-ro Soŝimoto.
G: Estis/as/os+ participoj. Tuta korelativa tabelo. Kvazaŭ -us. -ar

Ĉ. 21: S-ro B renkontas la japanan grupon, ili buse forlasas la flughavenon, sed iu perdis sian tekon.
L: Veter-prognozo; teksto pri la Abatejo de *Westminster*.
G: Ĉapitroj 20-25 firmigas kaj kombinas la gramatikaĵojn.

Ĉ. 22: En la Esperanto-kongreso, sed kie okazos la prelego de s-ro S?
L: La kongresa programo. Mendilo: 'Koncerto kun bondeziroj.'

...ktp ĝis ĉapitro 25.

Ni ne malkaŝos la enhavon de la lastaj tri ĉapitroj, sed en la legaĵoj oni konatiĝas plurloke kun veraj tekstoj el nia E-vivo: recenzo pri sonkasedo de rok-grupo *Persone,* kuir-receptoj el Rusio (ambaŭ el *Monato),* el informilo pri Antverpeno, teksto pri acida pluvo, reklamteksto pri *Fiat,* parto de sociologia verko por studentoj...

La libron fermas konciza superrigardo de la gramatiko laŭ sub-ĉapitroj, indekso laŭ gramatikaj finaĵoj kaj konsiloj, kiel prezenti E-gramatikaĵojn pere de Esperanto mem.

smg

Fragmento el la dialogo komence de ĉapitro 16:

Anjo: Nu, por forigi aŭtojn for de la urbo oni proponas novan ŝoseon — laŭlonge de la strando!

Braŭn: Laŭlonge de la strando? Sed ... tiu tute detruos la strandon kaj ruinigos la urbon kiel turisman centron!

Anjo: Ĝuste, kara, ĝuste! Sed oni diras, ke nur apudmare troviĝas sufiĉe da libera spaco por nova ŝoseo, sen malkonstrui domojn en aliaj partoj de la urbo.

Braŭn: Tio estas stultaĵo! Kiel reagis hotel-estroj en la urbo?

Anjo: Ho, kompreneble, ili ne deziras, ke konstruiĝu ŝoseo ĝuste sub la nazoj de gastoj. Tia ŝoseo fortimigos por ĉiam iliajn klientojn! Tial iuj organizis kunvenon ĉi-vespere en la urbodomo, por decidi, kio farendos.

Braŭn: Bone! Kaj je mia reveno nepre sciigu min, kio okazis ...

Via vico (1)

1. *Ĉu vi komprenas? Respondu al la demandoj:*

a. Dum kiom da tagoj jam restas s-ro Braŭn en Usono?
b. Kiaj detaloj pri la japana kontrakto ankoraŭ priparolendas?
c. Kiam Bruaĉo informis Rikardon, ke oni dungos lin?
ĉ. Rikardo 'bolas de ĝojo.' Klarigu alivorte la frazon!
d. Kial Rikardo ne estas hejme?
e. Kion oni proponas konstrui en Sudhaveno-sur-Maro?

La legajo de capitro 3:


El la taglibro de Klara Plot.

Ĉi-vesperon mi estis en la Sudhavena kinejo kun Rikardo Braŭn (la filo de la direktoro!) kaj liaj geamikoj. Li estas tre afabla, kaj mi estis tre danka pro la invito. Liaj geamikoj estas nun miaj… kiaj simpatiaj, amuzaj personoj!

La filmo estis nova, franca filmo pri fama dancisto, kiu bele dancis sed kiu ne plu dancas pro malsano. Kiel li plu vivas, estis la temo de la filmo. Ĝi estis tre kortuŝa.

Post la filmo ni tre bone manĝis en restoracio. Mi revenis malfrue al la pensiono. Mi estis laca, sed kontenta!

Parto de la mapo en ĉapitro 5:



Recenzo pri la verko, de Renée Triolle, aperis en *Franca esperantisto*, decembro 1994, p. 217.

Mendilo por libroj de ILEI

Sendu al: ILEI, Fácán köz 9/2, HU-2030 Érd, Hungario.

Titolo	NLG	SEK	HUF	Kvanto	Sumo
Tendaraj tagoj 1 (1-4 ekz., po	12	50	110	———	———
Tendaraj tagoj 1 (5-14 ekz., po	8	35	100	———	———
Tendaraj tagoj 1 (ekde 15 ekz, po	6 ~~7~~	28	90	———	———
Tendaraj tagoj 2 (1-4 ekz., po	15	60	140	———	———
Tendaraj tagoj 2 (5-14 ekz., po	10	40	120	———	———
Tendaraj tagoj 2 (ekde 15 ekz, po	9	35	110	———	———
Tendaraj tagoj 3 (1-3 ekz., po	16 ~~18~~	50	110	———	———
Tendaraj tagoj 3 (4-11 ekz., po	11 ~~12~~	35	100	———	———
Tendaraj tagoj 3 (ekde 12 ekz, po	10 ~~11~~	28	90	———	———
TT kompleto (1-3 ekz., po	39	160	420	———	———
TT kompleto (4-11 ekz., po	29	120	400	———	———
TT kompleto (ekde 12 ekz	25	100	380	———	———
Kunvojaĝu (30 NLG) (Gubbins)	*Mendu ĉe UEA aŭ Edistudio*		900	———	———
Teorio kaj prkatiko (1 aŭ 2ekz.)	24	96	600	———	———
de lingvo-instruado (ekde 3ekz.) (Szanser)	18	75	550	———	———

Bv. antaŭpagi la mendojn, ĉu al la konto *ilek-a* ĉe UEA en guldenoj, ĉu al la kasisto de ILEI en svedaj kronoj (adr. kaj kontonumero, kvara kovrilpaĝo). Bv. sendi al Budapeŝto pagopruvilon kun ĉi tiu subskribita mendilo

La prezoj en NLG kaj SEK **inkluzivas** la surfacajn sendokostojn. La prezoj en HUF estas **nur** por loĝantoj de reform-eŭropo kaj ne inkluzivas sendokostojn. Libroj aĉeteblas surloke ĉe HEA aŭ en 'Esperejo'. Por poŝta sendo en Hungario aŭ al najbaraj landoj aldonu por ĉiu libro 120 HUF, kaj al aliaj landoj 240 HUF. Pagu al Bp. forinte, per konverteblaj valutoj aŭ irpk.

ILEI dumtempe, (ĝis la 30a de septembro 1995) ofertas specialajn rabatojn, pro la proksimiĝo de la nova lerneja jaro, por TT1 (kvante), TT3 kaj kompletoj ajnkvante. Ĉi tiuj rabatoj validas nur ĉe ILEI; ĉe la libroservo de UEA normalaj prezoj validas, kaj tiuj ne inkluzivas la sendokostojn.

Do, kaptu la okazon nun! **Skribu viajn nomon kaj adreson dorse!!!!⇨**

juna amiko

Juna amiko havas la sekvajn temojn por la cetero de 1995:

☺ **95/2:** Manĝi kaj trinki ... tion, tion kaj tion.
☺ **95/3:** Instrui kaj lerni ... kion, kial kaj kiel.
☺ **95/4:** Kion ŝanĝi, kion konservi en nia mondo?

Same en 1996 la kvar numeroj havos verbajn temojn — legantoj rajtas jam ekde nun proponi kiujn verbojn ni elektu. Promeso verki ion pri viaj proponataj verboj signife helpos al ili gajni!

La abonprezoj por JA certe devos altiĝi en 1996; tra tri jaroj la guldena prezo restis senŝanĝa, dum niaj kostoj pli ol duobliĝis. Ni cerbumas, ĉu anonci modestan altigon (ĉ. 10%) kun senŝanĝa amplekso, ĉu altigi ĉ. 20% kaj aldoni 4 paĝojn ekskluzive kun pli simplaj kaj mallongaj eroj specife por komencantoj. Kion vi opinias; ĉu 32- aŭ 36-paĝajn numerojn vi preferos? Ĝis julio ni devos decidi kaj anonci la abonprezojn por 1996.

Sed bona novaĵo. Se vi mendos kaj pagos frue por 1996 (ĝis 30 sept. 95) vi rajtas pagi laŭ la tarifo por 1995 (v. sube kaj pli detale en JA 94/3). Ĝis tiu sama limdato ILEI ofertas 18-monatan abonon (95/3, 95/4 kaj la tuta 1996), por koincidi kun la nova lerneja jaro en la norda hemisfero: simple obligu la jarabonon per 1,5. Ekzemple: 16 NLG x 1,5 = 24 NLG.

Perantoj en ĉ 30 landoj akceptas abonojn en naciaj valutoj, variigitaj laŭ pagipovo. Vd. JA 94/3. Ili akceptos ĝis sept. abonojn 95, 96 kaj por 18 monatoj laŭ la nuna tarifo. La abonservo de UEA ne peros la 18-monatan oferton kaj akceptas nur plentarifajn abonojn (16 NLG) por kalendaraj jaroj.

KVANTO	NLG	SEK	HUF[1]	HUF[2]
1 ekz.	16	60	300	400
2-4 ekz	12	50	280	350
5-21 ekz.	10	40	240	300
pli ol 22 ekz	8	35	200	250

Pagoj en HUF nur por reform-eŭropo.
1=najbaroj de Hung.
2=aliaj landoj.
Irpk=70 HUF=1NLG

Mi mendas _____ ekz. por ☐ 1995 ☐ 1996 ☐ 6 numeroj ekde 95/3.

Mi mendis ❑ librojn dorsflanke, ❑ revuon *Juna amiko* supre.

Mi pagis al ❑ *ilek-a* ĉe UEA ❑ *juna-l* ĉe UEA ❑ la ILEI-kasisto
❑ Hungario ❑ JA peranto: .....

la sumon de:..... kaj aldonas pruvilon.

Nomo:.....

Adreso:.....

.....

Subskribo: ..... Dato:.....

Mazi proksimiĝas



"La unua intergeneracia KURSO DE ESPERANTO sur vid-bendo baldaŭ estos preta. Ĝi estas profesi-nivela instru-rnaterialo por infanoj, junuloj kaj... plen-aĝuloj. Temas pri adapto al Esperanto de BBC-filmoj *Muzzy in Gondoland* kaj *Muzzy comes back*".La 12-parta bendo estos preta en 1995 — la jaro de la 100-a naskiĝdatreveno de Andreo CSEH, kiu revis pri instru-materialo por infanoj, sed dum sia vivo ne sukcesis realigi ĝin." *MvdH*

Mendoj atingis 1300, inkl. 150 de JEI kun granda apogo de Fondaĵo Carson. Ĉiu antaŭmendinto ricevis numeron. Eblas ankoraŭ mendi. Eblas antaŭ-pagi, sed tio nun ne necesas. NEPRE MENDU por esti certa ricevi la bendon! Pro altaj kostoj kaj manko de spaco por konservi grandan stokon, IEI produktos NUR TIOM da ekzempleroj, kiom estas menditaj! Novaj mendoj (po NLG 180 + NLG 18 por registritaj sendkostoj) devas atingi la sidejon de IEI kiel eble plej baldaŭ, ĉar junie komenciĝos la produktado. Ne forgesu signi sur via mendo kiun bendo-sistemon vi bezonos, PAL aŭ NTSC!

La bendon oni certe montros en la UK en Tampereo, sed tiam jam malfruos ĝin mendi. Multaj ekzempleroj de la 10-minuta prov-bendo cirkulas; kiu ankoraŭ ne mendis provu spekti tiun bendon por konvinkiĝi!

"Laŭ lastaj informoj, la scenaro estas en Varsovio findecidita kaj la dubliga studio rezervita por la 2a de majo. Sekve mi nun (14a majo) atendas ricevi la definitive uzitan scenaron (aŭ eĉ bendon mem!) por povi eklabori pri la fina formo de la akompana(j) lernolibro(j) kaj gvidiloj." *smg*

"Mi esperas ke MAZI gastos ofte en IPR, kun opinioj, ideoj, konsiloj ktp. Por ke ili havu influon al prilaborata aldona instru-materialo bv. sendi ilin al la adreso de IEI (adr. dors-kovrile). Ĝi fariĝu nia komuna laboro. Pli bone nun kontribui ol poste kritiki."

"Ni devas jam pripensi la eblojn aldoni al la bendo nacilingvajn flug-foliojn kun koncizaj informoj pri la gramatiko kaj utiligado de Esperanto. Tiaj flug-folioj jam ekzistas en kelkaj lingvoj, ekz.:

1) pola: *Esperanto tylko tyle*? (E-to nur tiom ')
2) nederlanda: *E-to in een oogopslag* (E-to en unu okulfrapo),
3) germana: *E-to auf Einen Blick* (tradukita hispanen)

Ni aldonu raciajn argumentojn KIAL oni lernu E-ton kaj E-nacilingvan ŝlosilon. Se en iu lando oni ne havas tiajn inform-materialojn estas nun tempo prilabori ilin por tiel pere de Mazi varbi novajn adeptojn. La bendo estu ne nur instruilo, sed ankaŭ varbilo kaj pruvo ke E-to estas lingvo kiel la aliaj (eble eĉ pli interesa pro sia interna ideo)."

Mila v.d.Horst,Den Haag

Mil unuaj vortoj en Esperanto de Heather Amery, ilustris Stephen Cartwright, eldonis Brita Esperanto-Asocio, kun Usborne: 8.50 britaj pundoj + sendokosto

Tiu estas unu el serio da libroj de "Unuaj Mil Vortoj" en gamo da lingvoj. Unue mi renkontis la grekan varianton, kiam miaj nepoj (kiuj havas grekan patrinon) montris ĝin al mi. Ili videble trovis ĝin alloga kaj instruriĉa.

La formato por la plej granda parto de la libro estas du-paĝa bildo de ĉiutaga sceno, amuze desegnita kun multaj detaloj, kaj ĉirkaŭ la rando de la ĉefa bildo troviĝas individuaj bildetoj kun la koncerna vorto apude. Sekvas paĝoj pri temoj ne taŭgaj por tiu stilo, kun serio de individuaj ilustraĵoj, kaj finfine paĝo da vortoj sen ilustraĵoj kaj indekso de ĉiuj ilustritaj vortoj.

Multjara instruistino en unuagrada lernejo plendis ke estas tro da flavo en la bildoj. La formato ne taŭgas por multaj el la plej uzataj kaj gravaj vortoj. Pri kelkaj el la bildoj oni eble dirus ke ili montras tro da malbonkondutaj infanoj. Tamen, tiuj estas ĉikanaj kritikoj kaj nur ete malplibonigas altvaloran novan ilon de Esperanto-instruado, je ĉiuj niveloj; krom ke adoleskanoj eble sentus rankoron pri libro kiu notinde celas kaj koncernas pli junan aĝgrupon, dum plenkreskuloj pli senĝene agnoskos sian infanecon. Eĉ sperta parolanto eble ne tuj konos ĉiujn vortojn, ekzemple: *franĝbalailo, ampolo, lesivo, pato* kaj *tolaĵ-lavilo*.

Ĉiuj el tiuj venis de la dupaĝa bildo "La kuirejo", kiu montras kuirejon en stato de ĥaoso, kiu amuzas en bildo, sed eble ne en vera vivo, malgraŭ ke multaj kuirejoj aspektas same kelkfoje: la kato puŝas ladan ujon da pizoj de sur alta breto, kaserolo super-bolas, kukoj falas sur plankon, patro provas lavi potojn, infano havas kaserolon sur la kapo, dum patrino rifuĝas ĉe lavlinio en ĝardeno; ĝi estas bildo kiu invitas eĉ postulas multe da studo.

Scivolema infano eble sorbiĝos en ĝi dum longa periodo kaj tiel gajnos vortprovizon. En la klasĉambro ĝi estos mirinda stimulilo por konversacio kaj povos esti centro por skribado kaj tema laboro. Por plenkreskuloj la libro estos bonega helpilo por pligrandigi ĉiutagan vortprovizon. Laŭ mi ni devas esti sur la breto de ĉiu, kiu konas aŭ lernas Esperanton, kaj por instruisto aro estas bezonata. Krom lernolibro ĝi povos esti la plej utila instruilo.

Arnold Pitt, Britio.



Enhavo de *Mil unuaj vortoj*

4 La hejmo *
6 La kuirejo *
8 La ĝardeno *
10 La metiejo *
12 La strato *
14 La ludil-butiko *
16 La parko *
18 La besto-ĝardeno
20 La stacidomo/flughaveno/benzinstacio *
22 La kamparo *
24 La farmbieno *
26 La marbordo *
28 Ĉe la lernejo * (E-alfabeto mure)
30 Ĉe la hospitalo *
32 La festo *
34 La butiko *
36 Manĝaĵoj kaj trinkaĵoj
38 Mi (korpo-partoj, vestaĵoj)
40 Okupoj. La familio.
42 Agoj (pronomoj kaj verboj — ĉiuj netransitivaj aŭ refleksivaj)
44 Malaj vortoj (adjektivoj kaj prepozicioj)
46 Fantaziaj vortoj (el fabeloj kaj rakontoj)
48 Hejmbestoj
49 La vetero. La sezonoj.
50 Sportoj
52 Koloroj. Formoj. Numeroj.
54 La foiro. La cirko.
56. Vortoj sen bildoj (ĉ. 140)
57. Alfabeta vort-listo kun paĝindikoj.



j

jeleo, 33
jerzo, 39
jetas, 43
jetkubo, 14
ĵonglisto, 55
judo, 51
jurnalo, 5



k

kabano, 22
kafejo, 12
kafo, 36
kahelo, 7
kajo, 20
kajto, 16



* Tiuj paĝduoj prezentas grandan bildon kun rande la unuopaj nomitaj objektoj, tiel ke juna leganto ĝuos nomi la randajn objektojn kaj tiun objekton serĉi en la granda bildo. En la plimulto el tiuj bildoj lerte kaŝas sin ie flava anaseto, kun oni povas serĉi.

Recenzo: *Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado*. Aŭtoro: Irena Szanser. Eldonis: Internacia Ligo de Esperantistaj instruistoj, Budapeŝto 1992, 170 p. 22 cm. Firme bindita. Ilus. Prezo: 24 NLG. Triona rabato ekde tri ekzempleroj ĉe ILEI.

La aŭtorino estas eŭropkonata preleganto pri metodikaj demandoj de la Esperanto-instruado. En tiu ĉi libro ŝi prezentas la ĉefajn problemojn de la Esperanto-instruado el la vidpunkto de la ĝenerala fremdlingvo-pedagogio, tio signifas, ke ŝi esploras ne nur la relative limigitajn sferojn de la pura metodo-aplikado, sed ankaŭ la edukrilatajn taskojn de pedagogo. La bazaj ĉapitroj de la libro okupiĝas pri jenaj temoj:

❶ Ĝenerala lingvistika kaj metodologia enkonduko.
❷ Glotodidaktikaj kaj specifaj aspektoj de Esperanto-instruado.
❸ Elektitaj problemoj de psikologio.

En la unua ĉapitro (pp. 4-40) oni trovas liston de faktoroj, kiuj influas la elekton de konvena metodo laŭ la instru- kaj lernceloj, krome estas difinitaj kelkaj ofte uzataj faknocioj (ekz. indukta kaj dedukta procedoj). Sekvas trarigardo de psikologiaj kaj lingvistikaj konceptoj rilate al ilia efiko sur la praktikon de fremdlingvo-instruado (ekz. behaviorismo, strukturismo) kaj klarigo de bazaj metodologiaj konvinkoj de elstaraj lingvopedagogoj resp. metodikistoj (ekz. Komenský, Palmer). La multaj skoloj sur tiu ĉi tereno en skemeca formo estas komparataj. Aparta atento estas dediĉata al la rolo de la gramatiko en la instruado de fremdaj lingvoj dum la pasintaj jardekoj, eĉ jarcentoj.

La dua ĉapitro (pp.41-126) analizas la postulendan preparlaboron de instruanto por garantii difinitan sukceson en la akiro (ofte streĉa, sed pro tio ankaŭ kelkfoje amuza) de komunikativa kaj lingvistika kompetenteco flanke de la gelernantoj (almenaŭ de la plej granda parto de ili). Detala postularo pri la sinpreparo de la instruonto al ĉiu leciono kaj modela horskizo liveras sufiĉe da sugestoj, por ke oni ne tro supraĵe rilatu al la "interna ideo" de la fremdlingvo-istruado (kiu ja estas pli ol nura perado de komunikativaj kapabloj kaj prilingvaj scioj). Aparte utilaj por instruantoj-neprofesiuloj estas la konsiloj de la aŭtorino koncerne:

☺ regulan konsideron de fremdlingvaj kantoj por enkonduki aŭ plifirmigi leksikan materialon resp. gramatikaĵojn;

☺ kreadon de versaĵoj por eviti eblan konfuziĝon (ekz. je la transitiveco aŭ netransitiveco de verboj);
☺ analizon kaj iom-post-ioman minimigon de lingvaj eraraj (ekz. se ekzistas la danĝero de enlingva aŭ de interlingva interfero:

Ilustre, la germana vorto *Fleisch* egalas al la Esperanto-vortoj *viando* kaj *karno*; por germanlingvanoj kiel paronimoj estas rigardeblaj la vortoj *provi* kaj *pruvi,* ĉar ekzistas en la germana lingvo *proben* kaj *prüfen*, sed en la senco de *ausprobieren* estas aplikebla nur la vorto *provi*).

Sur la paĝoj 111-120 estas pritraktataj la diversaj ekzercotipoj cele de progresigo de la lernantaro ekde pura imitado tra duonproduktiva kaj poste ĝis (dezirata) produktiva apliko de la lingvaĵoj kaj de la koncernaj regulecoj. Apartan atenton la aŭtorino dediĉas al la t.n. *mediatoroj* (p.121-126),. kiuj prezentas en skemeca formo la ĉefajn respektendaĵojn, konsiderendaĵojn surkampe de la morfologio, vortfarado kaj sintakso. Pere de la mediatoroj eblas pliprofundigi la enmemorigadon de la plej gravaj preskriboj en la aplikado de la lingvo Esperanto.

En la tria ĉapitro (pp.127-158) estas traktataj psikologiaj nocioj, faktoj, konstatoj kaj observoj, por helpi al la instruanto klarigi al si difnitajn, nur ŝajne ne tuj klarigeblajn kondutvariantojn de lernantoj (granda atento, profunda kompreno, perfekta memorado unuflanke; subita laciĝo, persista kontraŭstaro, poreterna frustracio aliflanke).La plej malfacila tasko de profesiaj instruistoj en ĝeneralklerigaj lernejoj ja estas ne nur utiligi jam ekzistantan inklinon de la gelernantoj al intensiva okupigo pri fremdaj lingvoj, sed ankaŭ (eĉ prefere) veki la emon mense labori kaj fariĝi preta al memedukado kaj plulernado dum la postlerneja memstareco. Pro tio necesas, ke la instruanto lernu prijuĝi sin mem, lernu observi sian propran konduton kaj instrumanieron, por eble doni al la sekva generacio subkonscie imitindan ekzemplon (ekz. koncerne modestecon, helpemon, ĝentilecon, strebadon al mensa flekseblecо kaj plikvalifikiĝo).

Resume: La verko de I. Szanser estas por instruantoj de Esperanto tre taŭga kaj utila enkondukilo en bazajn sciojn pri la metodologio de la instruado de fremdaj lingvoj. Por partoprenantoj de "metodikaj seminarioj" ĝi estas rekomendinda kaj bezonata " puto", el kiu oni povas ĉerpi multajn instigojn por pli detala disputado.

Profesiaj fremdlingvo-instruistoj sentas certan mankon koncerne striktan difinon de la nocio *metodo* kaj troan simpligon koncerne la prezentadon de la unuopaj "skoloj" sub la tegmento de la strukturismo.

Till Dahlenburg, Germanio

Plia recenzo, de Donald Broadribb, aperis en *Esperanto sub la Suda Kruco* (organo de la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda E-Asocioj) en sept.-okt. 1994, p. 24.

Korespondu kun usonaj junuloj!

Instruistoj de Esperanto en publikaj usonaj elementaj lernejoj, kiuj invitas korespondadon kun siaj lernantoj:

S-ino Darlene ARCHER, 311 S. Mesquite Trail, Memphis, TX 79245
S-ino Lorraine BOUCHARD, 13727 Ella Lee Lane, Houston, TX 77077
S-ino Rarbara DUNN, 14809 Reserve Rd., Accokeek, MD 20607
S-ro Thomas GERLEMAN, 2219 Bollman Dr., 2D, Sheboygan, WI 53081
S-ino Suzette GRANGER*, 921 Chancellor, SW, Leesburg, VA 22075
S-ro Rudolf HINKE, 44 S. Wisconsin, Addison, IL 60101
S-ro Thomas KLOECKER, 3024 W. Parnell, #2, Milwaukee, WI 53221 *
S-ino Patricia KUEHNEL, 11917 Fallen Holly Ct., Great Falls, VA 22066
S-ino Adrienne LE DREE, 13100 S. Rhodes, Chicago, IL 60627
S-ino Gay LOUIS*, 1911 Bulkthorn Ln., Reston, VA 22091
S-ino Gail MARTIN*, 1103 Sharon Ct., McLean, VA 22101
S-ino Martha MOSELEY, Box 228, E. Middlebury, VT 05740
S-ino Mary K. MILLS, Box 1207, Ft. Stockton, TX 79737
S-ino Rhonda NELSON, 502 Countryside Rd., Junction City, KS 66441
S-ino Kathy RAY, 5565 Meadow Sweet Ln., Shawnee Mission, KS 66226

* - nur part-jara instruado.

Sendis mar. 1995: Kent JONES, Apartment D-6, 5048 Nth Marine Drive, Chicago, Illinois 60640, tel.: 13121 271-8673. Komisiito por klerigo, Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko (ELNA).

Mallonge ni mencias...

la sekvajn verkojn, kiuj ni recenzigos en estontaj numeroj:

ABC-Gramatiko de Esperanto, Christiane De Vleminck kaj Emile Van Damme. Antverpeno: FEL, 1994. 29cm. 240p. ISBN 90-71205-52-5. "Simpla, klara sed sufiĉe ampleksa gramatiko" estas la celo de la aŭtoroj: "totalan kompletecon ni tamen ne alstrebis." Klara grafika dismeto kun tabeloj kaj diagramoj kontribuas al la celo. Prezo: 1199BEF ĉe FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio.

Gramatika ABC-Mempraktikilo, akompana 144-paĝa kajero al la supra verko. Mult-specaj ekzercoj laŭ gramatikaj kategorioj kun referencoj al la koncernaj klarigoj en la gramatika verko.

Ĉu vi volas paroli flue? Andrzej Pettyn, Varsovio, 1994. 21cm. 18p. Konsiloj por memlernantoj surbaze de spertoj en kelkcento da E-kursoj kaj ĵurnalisma laboro en Pola Radio. Kiel memlerni sole kaj grupe. Kiel utiligi E-elsendojn, son- kaj vid-bendojn, ktp. Mendebla ĉe UEA, prezo ne indikita.

Asteriks gladiatoro, Goscinny/Uderzo. Izvori: Zagrebo, 1994. Tadukis: Nedeljko Korasic. 29cm. 48p. Jen dua E-traduko de la renoma gaŭla bildstrio. Malmuziks estas kaperita, portita al Romo kaj donacita al Cezaro. Ĉu tia ofendo restos sen puno? Mendu ĉe KEU, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb, Kroatio. 16,80 NLG plus 10% por sendokostoj. Kvant-rabatoj 17% ekde 3 ekz. kaj 30% ekde 10 ekzempleroj.



Ĉu vi aŭdis, ke... la sonkasedo el Szombathely por evoluigi aŭskult-komprenon denove estas akirebla pro dua eldono.

Bibliografio kvar-paĝa "Infan-libraro de nia familio" kompilita de Judita Schiller, Blazio kaj Marta Vaha aperis en speciala sekcio dediĉita al la Jaro de la Familio en *Literaturo Foiro*, decembro 1994, p. 313.

Dek fabeloj, Charlotte Kohrs kaj Dorothy Kruger. La Tigro, San Diego. 29cm. 36p. ISBN 0-939057-09-3. Ilustris Alan Henderson. Fabeloj en dialoga formo, kun afiksoj elstarigitaj. Belaj ilustraĵoj. Vortlisto kun anglaj tradukoj, kvin paĝoj da esperantlingvaj ekzercoj librofine.

Denaska dulingveco, Renato Corsetti (red.) UEA: Roterdamo, 1994? 29cm. 21p. Konsiloj por gepatroj surbaze de dokumento eldonita en Aŭstralio. La verko aliras la temon per koncizaj respondoj al serio de plej kutimaj demandoj, kun fine mallonga plurlingva bibliografio pri la temo.

Vinilkosmo-kompil' estas sonkasedo (aŭ kompakt-disko) kiu atestas la varion kaj nombron da aperintaj muzikverkoj en E tra la lastaj jaroj. Nun ili sufiĉas por kompili kaj eldoni 60-minutan antologion kun 15 titoloj, i.a. de Ĵorart kaj Nataŝa, Ĵak Ivart, Kajto, Flávio Fonseca, La Mevo, Solo, Amplifiki, Persone... Mendu ĉe UEA aŭ Eurokka, E-Rok-Asocio, F-31450 Donneville,

Francio. KD: 120FRF; 39NLG; 24 irpk. Son-kasedo: 70 FRF; 23 NLG; 14 irpk plus sendokostoj.

ABC de Esperanto, Ionel Onet. Eldonejo Bero, 1994. 21cm. 16p. Ilus. Ruman-lingva informilo pri la monda lingvo-problemo, argumentoj kontraŭ uzo de la angla, rusa kaj latina kiel mond-lingvo, kaj argumentado por Esperanto: strukturo, uzebloj kaj ruman-lingva bibliografio. 1 NLG.

Mondiaal, Ton Verwoerd, Heemskerk, 1994. 29cm. 36-paĝa. Nederlandlingva komencanta kurso por infanoj, kun fotoj de la propra klaso. Abunde ilustrita. Aparta kajero donas konsilojn en Esperanto por instruistoj. Kasedo donas proponc-ekzercojn kaj kantojn el San Diego, kiuj estas plektitaj en la kurson. Mendebla ĉe UEA, prezo ne indikita.

Unuminutaj noveloj, István Örkény (1912-1979). Eldonejo Bero 1994. 21 cm. 120p. Satiraj, amuzaj, frapaj noveletoj de renoma hungara verkisto, elektitaj de István Értl, tradukitaj tra la jaroj de deko da hungaraj esp-istoj. Pro la koncizeco, uzeblaj en kurso por progresantoj kiel materialon por ekzerci legan komprenon. 9.25 USD (inkl. sendokostojn) ĉe Eldonejo Bero, P.O. Box 13492, Berkeley CA 94712 Usono.

Confronting War (Alfronti Militon), Ronald J. Glossop. McFarland: Jefferson/London, 1994. Tria eldono. 23cm. 435p. Firme bindita. Esploro pri la plej prema problemo de la homaro. Zorge verkita, bone strukturita anglalingva verko por unuavice altlernejanoj pri la kaŭzoj, ecoj kaj efikoj de milito, kune kun serio de strategioj por konstrui pacon. Ekzistas ebleco eldoni koncizigitan Esperant-lingvan version de ĉi tiu verko. Kiu kompetentas pri la temo kaj la angla kaj emus kunlabori en tradukado, kontaktu la aŭtoron (adreso sur la dua kovril-paĝo.)

Ĝuste dum mi finverkas ĉi tiun lastan rubrikon, de poŝtisto alvenis...

Comprehensive English-Esperanto Dictionary, Peter Benson. ELNA 1995. 21cm. 607p. Ampleksa angla-Esperanta vortaro. Kun taŭgaj enkondukaj klarigoj, kaj skizo pri la esperanta gramatiko. Trafoliumo elstarigas du gravaĵojn: klopodoj post kapvorto doni multajn anglajn idiomojn kun adekvataj tradukoj; post ĉiu E-verbo staras indiko ĉu ĝi estas transitiva aŭ ne. Prezo ne indikita, petu de UEA aŭ ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono.

kompilis smg

Bonvolu sendi al la nova redaktoro de IPR kopiojn de recenzoj aperintaj pri lerniloj kaj pedagogiaj verkoj, ĉu por citado, ĉu por menciado. Landaj sekcioj bv. sendi siajn bultenojn al la redakcio kaj de IPR kaj Juna amiko. Se tiuj redakcioj ricevos du ekzemplerojn de novaj lerniloj aŭ edukaj verkoj, ili recenzigos ilin.

Por IPR kun pli vasta horizonto

Nia leterkesto

Estas pli ol evidente ke en la lastaj jaroj konsiderinde ŝanĝiĝis la cirkonstancoj en la mondo. Sen eksterordinara kapablo oni povas deklari ke nuntempe pri valoro, pli ol antaŭe, decidas la praktika utilo.

Praktika utiligo postulas kiel antaŭkondiĉon: malfermitecon, senperan kontakton kun la reala mondo, kiun ni celas parte modifi laŭ propraj kriterioj kaj konceptoj. Kiel rilatas la supraj konstatoj nian revuon? IPR celas nuntempe la membraron interan, la pedagogojn-esperantistojn, kie la akcento falas sur la duan elementon de la kunmeto.

En nunaj cirkonstancoj moderna revuo, kiu volas sin finance vivteni unuflanke, kaj plenumi sian destinon aliflanke, t.e. konvinki fakulojn en pluraj landoj pri la praktika valoro de Esperanto, tia revuo devas konstante moderniĝi penante konservi kompreneble, ĉiujn pozitivajn atingojn kaj tradiciojn.

Por proksimiĝi al la realigo de tio mi proponas modifi la strukturon de la revuo. Se ni deziras altiri la atenton de eksteruloj, ni devas aperigi artikolojn kun komune interesa enhavo. Mi konscias ke ni ne estas ankoraŭ sufiĉe fortaj por produkti tian revuon. Sed, feliĉe, ni ne bezonas malĝoji pri tio. De longa tempo ni ripetadas, ke Esperanto volas servi inter diverslingvaj popoloj malfacile sin komprenantaj. Nia tasko konsistos en tio, ke aktivuloj de ILEI el multaj lingvolandoj informu la redakcion pri la plej novaj pedagogiaj, metodologiaj artikoloj, kiuj povas esperi apartan intereson eksterlandan. Se krom niaj propraj, internaj problemoj la revuo donus vastan bildon pri aktualaj eventoj en la tuta mondo, kreskus la aŭtoritato de la periodaĵo kaj baldaŭ ĝi trovus, espereble, pli da abonantoj. La ĝisnuna legantaro nenion perdus, eĉ gajnus, ĉar vastiĝus ja ĝia spirita horizonto.

Laŭ tiu ĉi, skize prezentita koncepto, Esperanto estus en la servo de niaj membroj kaj en tiu de ĉiuj pedagogoj, potencialaj sekvantoj de la nunaj pioniroj. Tre povas esti, ke pasus jaroj sen okulfrapa sukceso, tamen ni ĉerpus forton el la konscio mem, ke ni plenumas taskon utilan kaj por ni kaj por niaj kolegoj alilingvaj.

Mi tre scivolas, kiel vi opinias pri la esenco de mia propono. Estus tre utile, se multaj malkaŝus siajn pensojn por kaj kontraŭ.

Géza Kurucz, Hungario

Lokoj restas en la gimnazio de ILEI., okazonta samtempe kun la ILEI-konferenco en Övik, Finnlando, 29 jul-4aŭg 95. Aliĝoj de 13–16-jaraj junuloj bonvenaj. Rabatitaj kotizoj. Skribu tuj al s-ro Barcsay Zs., Bem rakpart 25B, H-1101 Budapest por informoj.

Moderprezan agrablan apudmaran restadon ofertas de ILEI-konferenco. Eblas ankoraŭ aliĝi. Vidu la informilon/aliĝilon en IPR 94/3. Ĝis revido en Övik!

IPR 95/1 iris al ĉiuj membroj el 1994. Sed nur membroj por 1995 ricevos numeron 95/2, nun aktive preparata.

Ekzamenojn de ILEI/UEA provis 88 kandidatoj en 12 sesioj en 1995. Pro komputil-karaktrara malkongruo la liverita protokolo kaj ankaŭ kalendaro devos transiri al n-ro 95/2, same kiel pluraj aliaj eroj, ekz. pri stipendioj el Svedio, Atiljo en Afriko, Litova E-centro, rusa pedagogia laborplano, fremdlingva politiko en lernejoj de la EU... ktp. ktp...



Anonceto

Telefonkartojn, ĉefe uzitajn, el la tuta mondo kolektas: Vláda HASALA, poŝtkesto 34, CZ-696 62 STRÁŽNICE, Ĉeĥio; tel. (fakso) reg.: (++ 42) 631 2079. La anonceto konstante validas. Al ĉiu mi respondos..

Ĕŭropa Poezio en Esperanto

nova literatura organo.

Eldonas: Hungarla Esperanto-Asocio Andrássy út 27, HU-1061 Budapest.

Bv. peti prov-ekzempleron per tri internaciaj respond-kuponoj.

La ĵurnalisma faka asocio TEĴA enketis en 1994 inter siaj membroj pri la plej bonaj E-gazetoj. En la kategorio *fakaj revuoj*, la du gazetoj menciitaj estis *Juna amiko* kaj *Internacia Pedagogia Revuo*. Nur ses revuoj entute ricevis de iu respondinto maksimumajn poentojn, kaj *IPR* troviĝis inter tiuj.

La neceso trovi novan redaktoron por IPR instigis nin pli klare difini celaron por ĝi. La komisiito pri eldonado formulis propon-tekston, neniu estrarano trovis kialon šanĝi ion en ĝi kaj la nova redaktoro volonte akceptas ĝin — lia propra skribita imago por la revuo plurfoke eĥis punktojn el la sekva teksto, kiu estas nun malfermita al ĝenerala diskuto:

Celaro por Internacia Pedagogia Revuo

IPR estas la oficiala organo de ILEI kaj aperas 4-foje jare, kun normale 36-paĝaj numeroj. La redaktoro(j)n nomas kaj malnomas la Estraro de ILEI. La redaktoro(j) formas propran reton de vic-redaktoroj aŭ kunlaborantoj. La redaktoro decidas pri la enhavo kaj stilo de la revuo, respektante la Statuton de ILEI kaj ĉi tiun celaron, kiun la Estraro, membraro kaj redakcio diskutu kaj modifu laŭdezire. La revuo havas la sekvajn ĉefajn celojn:

1. Prezenti fakajn artikolojn pri:
— diversaj facetoj de lingvo-instruado, motivado, kaj komunik-kapabligo
— nuntempaj praktikoj,politikoj kaj evoluoj de fremd-lingva instruado
— kazo-studoj de efika instruado de Esperanto aŭ aliaj fremdaj lingvoj
— temoj el la Esperanta didaktika gramatiko

2. Liveri praktikajn didaktikajn helpilojn:
— kopieblajn labor-foliojn pri specifaj situacioj, temoj aŭ gramatikaj punktoj.
— recenzojn kaj bibliografiojn de lerniloj kaj instru-helpiloj.
— dialogojn, rol-ludetojn, artikoletojn, kantojn uzeblaj en la instruado.

3. Servi la membraron:
— informi pri aranĝoj por pedagogoj, precipe Esperantaj kaj de ILEI mem.
— aperigi rezultojn de ILEI-enketoj pri E-instruado, kaj eble administri tiujn.
— aperigi kontakt-adresojn de instruistoj dezirantaj interŝanĝi materialojn.
— raporti pri sukcesaj internaciaj kontaktoj starigitaj pere de Esperanto.
— raporti pri la agado de la sekcioj kaj membroj de ILEI.
— raporti kaj evtle. subteni edukajn iniciatojn de aliaj movadaj instancoj.
— aperigi ĉiujare la protokolon pri la internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI.
— aperigi ĉiujare la finacan raporton de ILEI.

4. Stimuli inform-fluon inter E-instruistoj kaj la pedagogia mondo.
— Aperigi informojn (kaj rekomendi aperintajn tekstojn) pri la potencialaj kaj realaj valoroj de E, pretaj por tradukado nacilingven.

— Konsideri la aperigon de enhav-resumoj de ĉiu numero en kelkaj (sed kiuj?) naciaj lingvoj.
— Aperigi informojn pri evoluoj kaj praktikoj en moderna lingvo-instruado.

Taskoj de la redaktoro

— Apliki konsekvencan lingvo-kontrolon al ĉiuj uzataj tekstoj.
— Decidi pri temoj kaj dezirindaj aŭtoroj por estontaj numeroj kaj rilati kun ili.
— Liveri prespretajn paĝojn al la presejo kun kontrolado pri sekura alveno.
— Liveri tuj post apero aŭtorajn ekzemplerojn al ĉiu aŭtoro aŭ kontribuinto aŭ koncernato, laŭeble kun dank-noteto.

Eblaj taskoj de redakciaj kunlaborantoj

— Liveri aŭ lingve kaj enhave kontroli almenaŭ du fakajn artikolojn jare, *aŭ...*
— Prizorgi difinitan rubrikon (kalendaro, enketilo, resumo de sekciaj bultenoj, recenzoj,), *aŭ...*
— Prizorgi la arigon de artikoloj pri anticipe deciditaj fakaj temoj.

Resume, la revuo unuavice subtenu la aktivajn instruistojn kaj instruantojn de Esperanto per livero de utilaj modeloj, praktikaj ekzemploj kaj spirita-idea kuraĝigo.

La ĝisnuna redakcio laboris sen skribita celaro, iliaj imagoj tamen similis al tiuj en la teksto. Eblus riproĉi, ke ofte la revuo ne plenumis tiujn celojn. Ne pro tio, ke ili ne konsciis pri tiuj indaĵoj, simple pro manko de fortoj ilin enkonduki aŭ daŭrigi.

Kiomgrade la nova redakcio sukcesos transformi la revuon dependos simile je la troveblo de laborfortoj kaj kunlaborantoj. Oni celas iom post iom kunmeti teamon de ĉ. ses regulaj redakciaj kunlaborantoj, kun porokaza helpo ĉiam bonvena.

Sin- aŭ malsin-proponoj por kunlaborantoj bonvenaj. Sendu ilin al:
IPR, Németh József, Kilian ltp. 75/9, HU-8500 Pápa, Hungario.

Novaj direktoj por IPR – vi helpu difini kaj realigi ilin!

Adiaŭaj vortoj

De la frontpaĝo de ĉi tiu longe atendita numero malaperis la nomo de la ĝisnuna redaktoro. Ŝi tutkore dankas ĉiujn, kiuj ebligis plenigi la paĝojn de la pasintaj dek unu numeroj, sendinte kontribuaĵojn. Ŝi honte pardonpetas ĉiujn, kiuj ne ricevis respondon aŭ honoran ekzempleron. La vivcirkonstancoj tiom ŝanĝiĝis enlande kaj persone, ke ŝia energio sufiĉis nur je teknika kunmetado de la gazeto. Fine ŝi petas vin, karaj legantoj, prenu novan elanon kaj esprimu vian fidon je la nova redaktoro — kiu ekredaktiĝos per la sekva numero — kontribuante per interesaj teoriaj kaj praktikaj artikoloj, novaĵoj, informoj.

Via KOVACS Márta

Ĝuste tiuj samaj ĉiam pli premaj viv-cirkonstancoj malebligis al la vic-redaktoro tuj transpreni la laboron kaj teni la aper-ritmon. Tial, li serĉis, kiel komisiito de eldonado por ILEI, novan redaktoron, unuavice en Hungario. Feliĉe, kandidato aperis, kiun akceptis la Estraro, kaj kiu intertempe pretigis la numeron 95/1, kaj nun laboras super 95/2. La vic-redaktoro, tiom helike pretiginta ĉi tiun mankantan numeron 94/4, bedaŭras anonci sian demision, sed aliĝos al formata redakcia teamo kiu subtenos la novan redaktoron.

smg

Konatiĝu nun kun tiu novulo per la sekva biografia skizo; foton vi povis/os vidi fine de numero 95/1. Li volonte ricevos kunlabor-proponojn el ĉiuj landoj, aparte de uzantoj de IBM-tipaj komputiloj. La redakcio havas ekde nun aliron al komputila ret-adreso (v. 95/1).

KONATIĜU KUN LA NOVA REDAKTORO

NÉMETH József naskiĝis en 1960 en Szombathely (okcidenta Hungario) kaj ĝis la 18-a jaraĝo vivis en apuda vilaĝo Tömörd. En 1983 li edziĝis. Jozefo klarigas: " mia edzino komprenas Esperanton. Ni havas du filojn, al la pli aĝa mi instruas hejme Esperanton."

Post gimnazio kaj soldatservo li ekstudis en la Pedagogia Altlernejo de Szombathely, studante matematikon kaj biblioteksciencon. Lia diplomlaboro analizis la publikajn kontaktojn de la hungaraj bibliotekoj kaj ekzamenis la kvaliton de la bibliotekaj afiŝoj kaj aliaj eldonaĵoj.

En 1983, post la studado li eklaboris en la urba biblioteko de Pápa. Ekde 1985 li estas instruisto en la bazlernejo Nagy László, instruante matematikon, komputadon kaj ekde 1986 ankaŭ Esperanton. Apud la ĉefa okupiĝo, li kromlaboris en gimnazia biblioteko kaj dum tri jaroj estris la kulturdomon de pedagogoj. En 1994 li sukcese trapasis mezgradan ekzamenon pri la germana.

"Esperanton mi eklernis en 1979 de Piroska Szabó, poste instruis min Balázs Wacha (Blazio), József Fülöp kaj Katalin Smidéliusz. En 1983 mi superis la "C" ekzamenon organizitan de HEA, en kies diplomlaboro mi okupiĝis pri la historio de mia nasko-vilaĝo. En la altlernejo mi reorganizis la E-grupon kaj instruis Esperanton en fakrondo. Dum tiuj jaroj mi partoprenis la surbendigon de la instrumaterialo de Blazio Vaha. En 1985 mi reorganizis la Esperanto-grupon de Papa."

En 1986 li trapasis ŝtatan lingvo-ekzamenon pri Esperanto, poste ankaŭ la mezgradan ILEI ekzamenon. Kune kun kolegino li finis la korespondan E-fakon en Szombathely en 1994. Iliaj gelernantoj dum 8 jaroj akiris 17 unuajn lokojn en la diversaj landaj E-konkursoj. (konkurso Szerdahelyi dufoje, Baghy sepfoje, Kalocsay kvarfoje, ekster-instanca landa konkurso kvarfoje).

"Pro enlernejaj ŝanĝoj la situacio de Esperanto nun estas iom malpli facila, sed ni povas daŭrigi la laboron komencitan. Nia lernejo havas interŝanĝan kontakton kun kroataj lernejoj. Pere de tio mi havas tre bonajn kontaktojn kun Spomenka Štimec kaj aliaj kroataj esperantistoj. Ili estis ĉe ni kvinfoje, ni vojaĝis al Kroatio trifoje. Mi kvinfoje entreprenis la organizadon de la Landa Esperanto-Deklamkonkurso. Ĝin ĉiujare partoprenis ĉ. 90-100 personoj".

"Mi regule aperigas artikolojn en la E-gazetaro kaj nuntempe ankaŭ en hungarlingvaj gazetoj. En 1985 kaj 1987 aperis du E-libretoj en mia traduko. La unua enhavis fabelojn, poemojn, la dua estas dulingva ŝercaro. Jam de kelkaj jaroj mi estas la redaktoro de *Savaria Esperanto Revuo*. Mia verkemo kaj redaktemo denove vigliĝis, kiam mi antaŭ unu jaro ekhavis komputilon".

Pápa, la 23-an de februaro 1995

SEKCIESTROJ de la LIGO

Albanio: Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana.
Argentino: Herminia Kirkerup de Fernandez, Calle Cerrito 1249, Barrio San Martín, AR-5000 Córdoba, (Córdoba).
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien.
Belgio: Raymond. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende.
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 Sao Paulo (SP).
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD.
Bulgario: Kiril Velkov, D. Todorov 9, BG-3000 Vraca.
Ĉeĥio: Miroslav Malovec, Bosonozská 15/10, CZ-625 00 Brno.
Ĉinio: Zhang Danchen, Gen. Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan.
Estonio: Eve Otsa, Liivalaia 30-12, EE-0001 Tallinn.
Finnlando: S-ino Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi.
Francio: S-ino F. Drouard, Chalet Denali, Chemin de Thural, FR-74920 Combloux.
Germanio: Michael J. Scherm, Staatliche Realschule Neu-Ulm, Albert-Schweitzer-Str. 12, DE-89231 Neu-Ulm.
Hispanio: Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, ES-41080 Sevilla.
Hungario: Kovács Márta, Ady E. u. 23-25/C, HU-1221 Budapest.
Israelo: Murĵan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv.
Italio: Catina Dazzini, C.P. 22, IT-54100 Massa.
Japanio: *vakas.*
Koreio: So Ĵin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900.
Kroatio: Ivan Bekavac-Basić, Kuŝlanova 59. HR-41000 Zagreb.
Kubo: H. Jiminéz, Vista Alegre 254 e/J.B. Zayas y Luz , Caballero, Vibroa, CU-11500 C. Habana.
Nederlando: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL- 1704 BH Heerhugowaard.
Nordameriko: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono.
Norvegio: Björn Thuv, Aröyveien 33, N-3135 Torod.
Pollando: p/a Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wroclaw.
Portugalio: d-ro A. M. Coimbra, Rua Colonel M. Leitão 20.1 Esq. PT-1700 Lisboa.
Rumanio: Prof. Popa Florica, Str. Erolior 29, ap. 7, R-1900 Timisoara.
Rusio: Irina Gonĉarova, Molodjoĵnaja 38-10, RU-143000 Odincovo.
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, RSM-43031 San Marino.
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, SK-05801 Poprad.
Slovenio: Sonja Tavĉar, Liminijanska 6, SI-66320 Porotoroz.
Sud-Afriko: *vakas*
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby.
Svislando: Mireille Grosjean, Rue du Temple 20., CH-2416 Les Brenets.
Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre).

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan.
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069.
Bangladeŝo: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000.
Centrafrika Respubliko: Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui.
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago.
Hindio: Abani Halter, Jamboni, P.O. Bolpur 731204, W. Bengal.
Irano: Mohammad Karamudini, P.O. Box 13445-747, Teheran. Iran.
Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur.
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak.
Kostariko: Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603-1000, San José.
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius.
Niĝerio: Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel.
Nov-Zelando: *momente vakas*
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara.
Togolando: Afantchao-B.Yao,B.P.20225 Lome.
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UA-253222 Kiev.
Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, Taŝkent.

LABORKOMISIONOJ

Didaktikaj ludoj: Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle, Belgio; tel. (+32 71) 43 62 05.

Ekzamenoj: prez.: d-ro Till Dahlenburg (adreso, kovrilo 2). Sekretario de elementa kaj meza niveloj: d-ro Ivan Bekavac-Basic (adreso, kovrilo 3)

Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj: Edward Symoens, Putsesteenweg 151, BE-2920 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (+32 3) 666 62 66.

Gazetara servo kaj informado: *vakas sed pretas kunlabori:* Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien, Aŭstrio; tel. (+43 222) 36 86 29.

Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyiri u. 11, HU-6000 Kécskemet, Hungario.

Lerneja kontaktigo kaj statistikado: Provizore plenumata pere de *Juna amiko.*

Statuto: Rob Moerbeek kaj Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, Nederlando; tel. (+31 2209) 15 65.

Terminologio: *vakas*

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO: (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, FR-75007 Paris. Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, FR-75010 Paris

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.

IEI: Internacia Espereanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag.

KCE: Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR estu laŭeble nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por aŭtomata komputiula enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Vidu paĝoj 34 kaj 35 de IPR 94/3. Adreso de la nova redakcio sur p. 34. Bv. skribi vian nomon kaj adreson sur via manuskripto. Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitaj paĝoj. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenaj. Ni recenzas nur ricevitajn eldonaĵojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado. Regulaj redakciaj kunlaborantoj serĉataj, ekzemple por prizorgi iun rubrikon – prefere kun aliro al komputilo kaj kapablaj liveri materialon diske aŭ presprete.

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksis kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto:

Kasisto de ILEI: B. Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo). Membreco kostas 80 svedajn kronojn en landoj sen sekcioj kaj 100 SEK en landoj kun sekcioj (la sekcio ricevos la diferencon). Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA:

UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: *ilek-a.* aŭ por *Juna amiko*: *juna-l.* Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago. Membreco: 20 GLD en landoj sen sekcioj, 25 GLD en landoj kun sekcioj.